# *La imperio de gvatado: prezentita de Ramonet en la librofoiro de Havano.*




Havano, 13 feb (RHK) La franca intelektulo Ignacio Ramonet prezentis en tiu ?i urbo sian verkon *La imperio de gvatado* kadre de la 26-a internacia librofoiro, en la halo Guillén en la fortreso de La Cabaña kun enkonduko de Abel Prieto, ministro de kulturo, kaj la ?urnalistino Rosa Miriam Elizalde.

La libro celas klarigi kiel la registaroj konstruas la gvatadon sur siaj propraj civitanoj, profitante la informojn mana?atajn de entreprenoj  kiel Google, Facebook a? Apple, certigis la intelektulo, anka? direktoro de la gazeto *Le Monde Diplomatique.*

Ramonet emfazis ke en la kunformado de la teksto uzis informojn liberigitan kaj uzeblan. “Mi klopodis krei libron de ?urnalisto, kie ne ekzistas datumo rezervita”, li aldonis.

La libro konsistigas sa?an kaj dokumentitan ateston pri la kontrolo de la ?tatoj super la homaro, havante kiel pretekston la batalo kontra? terorismo, asertis la ?urnalistino Elizalde dum la libroprezento.

*La imperio de gvatado* havas valorajn atestojn de personecoj kiel Noam Chomsky kaj Julian Assange, kaj rekonas la bezonon de juraj garantioj por la uzantoj de interreto.

La libro estis publikigita unuafoje en 2015, origine en la franca lingvo, kaj la kuba eldono konsistigas la trian en la hispana.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/121396-la-imperio-de-gvatado-prezentita-de-ramonet-en-la-librofoiro-de-havano

**Radio Habana Cuba**